



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Numero 5 • Septembro/Oktobro 1962

Dum dekjara periodo:

BULTENO informilo, interligilo, varbilo

En oktobro 1952 aperis la unua eldono de la BULTENO, la organo de la Germana Esperanta Fervoja Asocio. De tiu tempo BULTENO seninterrompe informis la legantojn pri aktualaĵoj el la fervojista Esperanto-movado kaj publicis fakajn artikolojn. Kun la ekstera aspekto pliboniĝis ankaŭ la ĝenerala reputacio de nia asocio. Ni uzas la okazon de tiu jubileo por sincere danki al ĉiuj, kiuj finance,

morale kaj per kontribuoj ebligis la aperadon de nia organo. Ni esprimas la esperon, ke BULTENO kune kun siaj fidelaj legantoj enkaĵ eksterlande modeste helpos efektiviĝi la noblajn celojn de la Esperanto-movado, precipe inter fervojistaj gekolegoj. GEFA

Flanke de la Sociala Organizo de la Germana Federacia Fervojo, kiu eldonas nian organon, s-ro d-ro Kühne dediĉas jenan prologon:

Grußwort des Hauptvorstands des Bundesbahn-Sozialwerkes

Unsere Eisenbahner-Esperantisten sind zwar im Bundesbahn-Sozialwerk ein verhältnismäßig nur kleiner Kreis, die Zahl aber bildet keinen Maßstab für ihre Bewertung. Vielmehr kommt es sehr wesentlich auf den Geist an, der eine Gemeinschaft beseelt. Die Liebe, mit der die Freunde der „Internationalen Sprache“ allen Schwierigkeiten und allem Unverständnis zum Trotz als eine große Familie ihrer Idee dienen, muß anerkannt werden. Die alljährlichen Kongresse des Internationalen Eisenbahner-Esperantisten-Verbandes (IFEF) zeugen ebenfalls von einem stark ausgeprägten Zusammengehörigkeitsgefühl und beweisen, daß der Gedanke einer alle Menschen verbindenden Sprache mit Gewinn zu verwirklichen wäre. Vermag doch das Esperanto allen an eine Kultursprache zu stellenden Anforderungen vollauf gerecht zu werden,

Salutvorto de la ĉefestraro de la Fervoja Sociala Organizo

Niaj fervojistaj esperantistoj en la Sociala Organizo de la Federacia Fervojo estas ja relative malgranda anaro, sed la nombro ne estas mezurilo por ĝia estimo. Pli multe valoras la spirito, kiu vigligas unuigon. La amo, per kiu la amikoj de la „Internacia Lingvo“ servas kiel granda familio al sia ideo, malgraŭ ĉiuj obstakloj kaj ĉia nekompenemo, devas esti agnoskata. La ĉiujaraj kongresoj de la Internacia Federacio Esperantista Fervoja (IFEF) same atestas pri la forte esprimita solidareco kaj pravas, ke la ideo de ĉiujn homojn liganta lingvo profitdone povus realiĝi. Ĉar Esperanto kapablas plenumi abunde ĉiujn postulojn necesajn por kulturlingvo, kaj la landaj asocioj dank' al siaj densaj interligoj kontribuas fruktodone por la internacia kulturinterŝanĝo de la fervojistoj.

La ĉefestraro de la Sociala Organizo

und die Landesverbände leisten dank ihrer engen Verbundenheit untereinander einen fruchtbaren Beitrag zum Internationalen Kulturaustausch der Eisenbahner.

Der Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks würdigt die unbestreitbare Tatsache, daß die Freizeit vieler vom Bildungsstreben erfüllter Eisenbahner durch die Beschäftigung mit dem nur scheinbar so „leichten“ Esperanto sinn- und wertvoll wird. Der Esperantofreund muß gerade seine Muttersprache kennen, er muß logisch denken und sein Sprachgefühl ständig vervollkommen. Der persönliche Umgang und der Briefwechsel mit Menschen aus der ganzen Welt verleihen ihm ein sicheres Auftreten. Er lernt, sich in Wort und Schrift gut auszudrücken, und weitert seinen Blick. Eisenbahner, denen es nicht vergönnt war, auf der Schule Fremdsprachen zu erlernen, dringen mit und durch Esperanto in Gebiete ein, die ihnen sonst verschlossen bleiben müßten. Ihnen eröffnen sich viele Möglichkeiten einer Weiterbildung an Geist und Seele, an allgemeinem wie an Fachwissen.

Zehn Jahre ist es nun her, seitdem der Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks dem Wunsch der Esperantisten, ihnen ein eigenes Mitteilungsblatt zu schaffen, in vertretbarem Umfang entsprochen hat. Im Rückblick auf diese Zeit kann man wohl mit gutem Gewissen sagen: Das auch in seinem Äußeren gefällige „BULTENO“ ist der ihm innerhalb seines Wirkungsfeldes gestellten Aufgabe — Bindeglied und Werbemittel zu sein — gerecht geworden. Vor allem teilt es nicht das Schicksal so vieler Mitteilungsblätter, achtlos beiseite gelegt zu werden, sondern es wird tatsächlich aufmerksam gelesen. Hierfür muß den Schriftleitern, die das „BULTENO“ in fleißiger und selbstloser Arbeit gestaltet haben, der schuldige Dank gezollt werden. Es ist zu wünschen, daß die kleine Zeitschrift auch weiterhin jenen Kollegen Freude und Anregung zu geben versteht, die nicht müde werden, mit Fleiß, Ausdauer und ehrlicher Hingabe einem Leitbild nachzustreben, das — unabhängig davon, ob sich in absehbarer Zeit ein „praktischer Nutzen“ ergibt oder nicht — Achtung verdient. Entscheidend ist hier, welchen Gewinn der einzelne davonträgt, und daß er für den einzelnen tatsächlich sehr groß ist, dürfte längst bewiesen sein.

So gelten dem „BULTENO“ und seinen Lesern die besten Wünsche des Haupt-

estimas la nediskuteblan fakton, ke la libertempo de multaj fervojistoj celantaj klerigon fariĝas senchava kaj valora per la okupo kun la nur laŭŝajne tiel „facila“ Esperanto. La Esperanto-amiko devas ja koni sian gepatran lingvon, pensi logike kaj perfektigi daŭre sian lingvosenton. La persona kontakto kaj la korespondado kun homoj el la tuta mondo donas al li memcertan konduton. Li lernas esprimiĝi bone, buŝe kaj skribe, kaj vastigas sian horiconton. Fervojistoj, kiuj ne povis lerni fremdajn lingvojn en la lernejo, per Esperanto penetras en terenojn, kiuj alie devus resti fermitaj. Al ili prezentas sin multaj ebloj por klerigi spiriton kaj animon, ĝeneralan kaj fakan scipovon.

Dek jaroj nun pasis, de kiam la ĉefestraro de la Fervoja Sociala Organizo plenumis laŭ siaj ebloj la deziron de la esperantistoj, ke estu eldonata informilo. Rerigardante tiun periodon oni povas diri konscie: la „BULTENO“, plaĉa ankaŭ per sia ekstera aspekto, bone plenumis sian taskon interne de sia agosfero, esti interligo kaj varbilo. Precipe ĝi ne partoprenas la sorton de multnombraj informiloj, esti flankenmetata senatente, sed efektive ĝi estas legata kun intereso. Pro tio la redaktoroj estu sincere dankataj, kiuj formis la „BULTENO“ en diligenta kaj malegoisma laboro.

Estas dezirinde, ke la malgranda jurnalo scipovos plu doni ĝojon kaj instigon ankaŭ al tiuj kolegoj, kiuj ne lacigas strebi per diligenteco, persisto kaj sincera sindono al gvida ideo, kiu — sendepende, ĉu post certa tempo rezultos „praktika utilo“ aŭ ne — meritas estimon. Decide estas tiurilate, kian gajnon la unuopulo havas, kaj ke la individua profito estas tre granda, devus esti pruvite jam delonge.

Tiel al la „BULTENO“ kaj al ĝiaj legantoj estas dediĉataj — la plej bonaj deziroj de la ĉefestraro kaj krome de ĉiuj kolegoj en la Fervoja Sociala Organizo, kiuj volas antaŭenigi ne nur sian propran hobion, sed konscias, ke multaj vojoj staras malfermaj por la cluzo de kulturaj valoroj.

Dr. Kühne

vorstands und darüber hinaus wohl aller Kollegen im Bundesbahn-Sozialwerk, die nicht ausschließlich ihrer eigenen Liebhabelei das Wort reden wollen, sondern sich bewußt sind, daß für die Pflege kultureller Werte viele Wege offen stehen. Dr. Kühne

Redaktoroj de 1952 ĝis 1962

A. Simon, redaktoro de 1952 ĝis 1954

Ĝis la kongreso en Lindau 1952 la gvidado de GEFA estis en la manoj de kol. Pape. Mi mem apartenis al al Kongresa Komitato, kies abunda laboro je tiu okazo ne povas esti priskribata. Tiu kongreso estis tre sukcesplena por la plua evoluado de la germana fervojista esperantistaro. Naskiĝis dum ŝipveturado al la insulo Mainau la projekto eldoni nian BULTENO. Pro ekonomiaj kaŭzoj la multobligo okazis per fotokopio. Mi desegnis la hodiaŭ ankoraŭ uzatan titolkapon kaj skribis la artikolojn de la sekvaj 10 numeroj mem per mia skribmaŝino. La plej multaj artikoloj estis verkitaj de mi. Pro tio, ke je tiu periodo mi estis ankoraŭ komencanto, kelkfoje ankaŭ eraraj ensteliĝis. Okaze de la hodiaŭa jubileo mi sincere dankas al ĉiuj kontribuantoj. Iliis helpis plivastigi la bonan reputacion, kiu BULTENO havis jam baldaŭ post sia apero.

Joachim Gießner, redaktoro de 1954 ĝis 1957

La BULTENO n-ro 13/1954 enhavis frontartikolon „Rerigardo kaj Antaŭrigardo“. Ĝi sciigis al la membraro gravajn ŝanĝojn inter la gviduloj de GEFA. Pro la samaj kaŭzoj, kiuj daŭre kaj ĉie minacadas la funkciulojn de honoroficoj, nome la troŝarĝo per laboro, ankaŭ tiam fariĝis necese „renovigo de la sango“. Kvankam mi mem ne povis plendi pro tro malmulte da deĵora okupado, mi tamen redaktoriĝis, por eviti embarason en la BULTENO-eldonado. Krome mi devas konfesi, ke la taskoj de redaktoro allogis min, kaj mi vere volonte transprenis ilin.

GEFA tiam troviĝis en stato iom alia ol nuntempe. La unuaj jaroj de ĝia ekzistado estis for, kiam multaj kolegoj kolektiĝis sub la verda stelo nur pro tio, ĉar vojaĝoj helpe de tia organizo multe pli facile estis efektiveblaj ol por simpla turistoj. La asocio travivis intersticon inter tiu pasinta tempo kaj nova evoluo pli solida, sed ankaŭ multe pli komplika. Jam evidentiĝis, ke la oficialaj instancoj fervojaj ne plu subtenis la organizon tiel favore kaj aktive kiel en la jaroj 1949 ĝis 1951.

En tia situacio estis tasko de la BULTENO, fariĝi des pli forta ligilo inter membraro kaj estraro. Tiasence oni ankaŭ devas kompreni la alvokon al la membroj, kunlabori por sia BULTENO. „Ne unu, ne kvin aŭ ses personoj kapablas sorĉi Bultenon el nenio“ mi skribis, fakto cetere, kiu

ankoraŭ nun validas, ĉar daŭre la redaktado suferas pro nekontentiga alsendo de kontribuantoj. Mi klopodis, daŭrigi la de mia antaŭulo Simon donitan linion kaj fari la enhavon de nia modesta BULTENO kiel eble interesa kaj aktuala. Raportoj precipe el la fervojista movado, pri la societa vivo kaj informoj pri okazontaĵoj estis nur unu celo de mia redaktado. Aliaflanke same grave estis taŭgigi nian organon esti propagandilo ankaŭ en neesperantistaj rondo. Pro tio pli ofte aperis germanlingvaj tekstoj kaj resumoj, por esti prezentataj al kolegoj, superuloj, administraciaj instancoj ktp. Krome aperis tradukoj el fakrevuoj, kiujn oni facile povis kompari kun la nacilingva originalo.

Dum la jaroj de mia redaktado pli kaj pli mi devis kromokupi min pri aliaj taskoj en nia asocio, tiel ke fine mi ne plu povis plenumi ĉiujn tiujn devojn samtempe. Pro tio komence de 1957 mi devis rezigni la tre ŝatatan oficon de redaktoro kaj metis ĝin en la manojn de kolego Steinig.

Paul Steinig, redaktoro de 1957 ĝis 1960

Ĉu povis esti por mi — iama lerninto en humanista gimnazio unuflanke kaj fervojisto aliaflanke — alia decido ol „fariĝi esperantisto“, kiam mi iutage spertis pri la ekzisto de Internacia Ferfojista Esperanto Federacio, kiu ĉiujare en fremda lando kongresas?

Nature ne! Kaj pro tio mi do fariĝis IFEF-ano, kiu ekde 1950 kiel trankvila kaj nefama vizitanto partoprenis ĉiujn IFEF-kongresojn, ĝis finfine en la Stockholma kongreso okaze de aparta kunveno de la germanaj partoprenintoj iu ajn la ideon spritan proklamis, ki mi estu la plej taŭga persono redaktora por nia eta fervojista Bulteno, kiun ĝis tiam estis prilaborinta la prezidanto mem. La atako sukcesis, ĉar mi estis per mia sola kontraŭvoĉo malsukcesa al la balotrezulto. Tiel mi do iĝis redaktoro, post kiam mi estis informita de mia antaŭulo pri la taskoj farendaj sur tiu ĉi posteno.

Profunde ankoraŭ ne entuziasmigita, sed tamen konvinkita, ke ofero tia devas esti farota ĉiam por sukcesa afero, mi komencis mian laboron, pri kies amplekso mi eĉ ne havis iom da imago. La noveco de la tasko kaj fine ankaŭ la fakto, ke la kun la ellaborado de BULTENO ligita intensa okupado deviga ankaŭ efikus personan lingvan

pliperfektigon, estis kvazaŭ incito kaj prezo por la laboro farota, kiun mi do imagis al mi tiel simpla, kiel oni estis prezentinta al mi en Stockholmo persvadante al mi la transprenon de la laboro. Se montrigis tiuĉi mia opinio granda eraro, do pro tio, ĉar la entuziasmo pri libervola kunlaboro promesita en la kongreso laŭ sperto baldaŭ ekdormis, kaj la redaktoro fakte fariĝis la sola verkanto de sia revuo. Ĉimaniere ankaŭ ĉio evoluis kaj kelka BULTENO estiĝis, kreita de „alfa ĝis omega“ de la redaktoro mem. Eĉ tio ne estis mal-interesa, sed pretendas multe pli da tempo ol dezirate, kaj tial ankaŭ okazis, ke kelka vespero, kelka sabato aŭ dimanĉo, kiujn familiestro prefere dediĉu al sia familio, devis esti oferata al Esperanto por verki la BULTENO kaj certigi ties ĝustatempan eldonon. Per la kreskanta membronombro ne kreskis ankaŭ la nombro de la kunhelpantoj, sed nur plimulte la farenda laboro.

Ĉirkaŭ trans 4 jaroj mi faris tiun redaktoran laboron kontraŭ kelkaj malfacilaĵoj kaj rezistoj eĉ deĵoraj, ĝis fine pro trostreĉo okaze de malsano mi devis transdoni la taskon al posteulo.

Tamen, kiel ĉiu laboro farita estas ankaŭ tiu redaktora laboro por nun bela rememoraĵo pri iama tre interesa, nur kelkfoje teda laboro. Sonas kvazaŭ monero tintanta, se ankaŭ hodiaŭ — pli ol du jarojn post la demisiigo — Esperanto-postaĵoj el la tuta mondo alvenas en mia deĵorejo adresitaj al mia persono. Venas ili el Argentino, Brazilo aŭ Usono, el Madagaskaro, Ĉinio, Aŭstralio aŭ eĉ Moskvo. Ĉiam denove tiam eksonas la ĝojo en mi spertante, ke eĉ en la plej malproksimaj landoj iam ereto de nia laboro libervola fariĝis la ekkomenco de amikecaj rilatoj inter samideanoj, al ni nekonataj homoj el la Esperanto-movado kaj nia fervojista federacio.

Pli alta rekompenco ne eblas.

Gerd Korth, redaktoro de 1960 ĝis 1961

Por diri la veron: ĉio, kion mi antaŭ kvar jaroj sciis pri Esperanto, estis, ke ĝi estas la nomo de iu artefarita lingvo! La konata homa inerteco malhelpis min, de mi mem esplori la karakteron de tiu lingvo. Se mi estus farinta tion, mi estus fariĝinta esperantisto pli frue. Sed la sorto destinis por mi atendi, ĝis mi jam estis 46-jara, por havi fruktodonan renkontigon kun Esperanto.

Pri la cirkonstancoj de tiu renkontigo en la jaro 1958, dum la tagoj de la Universala Esperanto-Kongreso en Majenco, mi rajtas rakonti nur, ke iu hazardo ĵetis en miajn manojn la konatan

folieton „Esperanto auf einem Blatt“ (E. sur unu folio). Kaj tiu hazardo grave influis mian vivon: mi ne povis ne fariĝi Esperantisto!

Dum la trarigardo de la folieto mi mirigite devis konstati, ke Esperanto estas lingva kreitaĵo, vere genia kaj unika. Kaj hodiaŭ, post kvarjara okupiĝo pri Esperanto, mi povas diri nenion alian ol tion, ke mi bedaŭras, esti konatiĝinta kun Esperanto ne pli frue.

Tenante la folieton kun la lingva sistemo kaj vortareto en miaj manoj, mi certe troviĝis en situacio simila al la situacio de tiuj homoj, al kies prijuĝo d-ro Zamenhof unuafoje transdonis sian projekton. Tamen ekzistas granda diferenco: ili tenis en siaj manoj en formo de libreto ĵus naskitan bebĉon, de kiu neniu povis scii, ĉu ĝi vivos, sed mi tenis en miaj manoj en formo de folieto vivantan lingvon, mi bezonis nur surpaŝi jam profunde kulturitan terenon kaj ĝui tion, kion miaj antaŭuloj estis kreintaj per kaj por la internacia lingvo. Esperanto vivas, ĉar ili estis fidelaj, kaj Esperanto vivos, se ni estos fidelaj!

Estas nun dek jaroj, dum kiuj nia BULTENO fidele servis al niaj celoj. Miloj, milionoj da presliteroj poresperantaj kaj porfervojistaj kovras ĝian blankan dorson. Kiel iama redaktoro mi tutkore deziras, ke la BULTENO, ŝatata interligilo inter ni kaj spuglo de nia strebado, longe vivu kaj fariĝu iom-post-iom tiu germana Internacia Revuo Fervojista, kies aperadon senpacience atendadas la internacia rondo de la Esperantistoj fervojistaj.

Wilhelm Barnickel, redaktoro de 1962

Redakti alternmonate aperantan organon, ekster de servaj kaj privataj devigoj, ŝajnas esti agrabla hobia konsiderante, ke nia Internacia Lingvo kvazaŭ trapasas flugante la lingvajn barilojn, kaj fidante, ke el la esperantista plumo ŝprucas altkvalitaj kaj modele konstruitaj pensoj. Kia seniluziio, kiam la redakcia laboro transiras de la antaŭulo sur la proprajn ŝultrojn! Tre baldaŭ la novbakita ĉefredaktoro konstatas, ke laŭ la speco de la situacio, li devas ludi foje la rolon de anonca komisiito. Alian fojon oni superŝutas lin per petoj publici iujn alvokojn aŭ recenzi eksterlandajn prospektojn. Pacience li admonas bonvolajn kontribuantojn pri baldaŭa livero de promesita artikolo. Oni eĉ petas lin interveni pro privataj konfliktoj.

Dum okaze de kongreso la oratoroj prezentas sian elokventecon, dum la aŭskultantoj pli malpli

scivoleme rigardas vizaĝojn kaj vestaĵojn, la redaktora cerbo jam serĉas trafan pri- kaj surskribon. Lia kraĵono paperigas rimarkindajn parolojn kaj notas kun certa skeptiko statistikajn ciferojn. Kelkfoje aperas ankaŭ subtilaj observoj, sed multo perdiĝas pro manko rutino kaj tempo.

Hejme, plej ofte malfruvespere, kaptas lin la emoj traduki interesan fakartikolon. Sed por plenumi ĉion modele, li devus rezigni la dormon. Pro tio rezultas ofte nur modesta realigo de projektoj.

Tamen la materialo por la BULTENO iel kompletiĝas. La presejo klopodas plenumi la ofte kuriozajn dezirojn de la redaktoro, kiu siaflanke vere batalas kun la preseraroj de la presprovaĵoj. Sed fine la plej nova numero estas preta por esti sendata al la pacience atendantaj membroj de GEFA. Kiam ili ekstudas la enhavon, la redaktoriaj interesoj direktas sin jam al la sekvonta eldono.

Estus senĝuste prisilenti la internan kontentigon ligitan kun tiu laboro. En materialisme direktita mondo, kie eĉ la postlaboraj okupoj estas komerce gvidataj kaj ekspluatataj, ĉiu spirita okupo sur idealisma bazo estas valora, des pli multe, ĉar temas pri nia Internacia Lingvo.

Kongresanalizoj

En la postkongresa numero de „La Fervojisto“ — organo de niaj francaj kolegoj — aperis artikolo de la prezidantino, fraŭlino Lemonnier, sub la titolo „Kiu kulpas?“ Ĝiaj vortoj valoras atenton kaj pripensadon. Jen kelkaj linioj pri la temo kiel kontribuo por diskuto. Temas ĉefe pri tio, ke nur relative modesta parto de la kongresanoj vere regas la lingvon, interesiĝas pri la kongreslaboroj kaj serĉas lingvajn kontaktojn kun alilandanoj. Temas ankaŭ pri tio, ke oni tro forte „tevas pri alta nombro da partoprenantoj“, anstataŭ akcenti ties lingvan kvaliton kaj „oni riskas, ke kongreson devos organizi grupeto da sindonemuloj, kiuj oferos al turisma aranĝo tempon, kiun ili pli utile povus uzi por la lingvo aŭ la movado mem“.

Jen problemoj ekzistantaj preskaŭ same longe kiel nia faka movado, sed kiuj fakte pli kaj pli multe influis la karakteron de niaj kongresoj.

Jahresbeitrag 1963

Bitte, überweisen Sie bald den Jahresbeitrag von 2,50 DM für GEFA / IFEF!

Neuer Bezirksbeauftragter in Augsburg

Der seitherige Esperanto-Beauftragte im Bundesbezirk Augsburg, Barmaneter, kann aus dienstlichen Gründen seine Aufgabe nicht mehr wahrnehmen. Mehrere Jahr lang versah er dieses Amt gewissenhaft und verdient daher den aufrichtigen Dank des Vorstandes und der Vereinigung. Wie er erklärte, will er sich auch in Zukunft für die Esperanto-Arbeit im Bezirk einsetzen.

Neuer Bezirksbeauftragter ist **BI Schießl, Betriebsamt Kempten**, Basa 964/844/430. Wir freuen uns über seine Bereitschaft, in der Verbreitung des Esperanto innerhalb der deutschen Eisenbahner mitzuarbeiten, und wünschen ihm für seine Tätigkeit einen guten Erfolg.

Gießner, Vorsitzender

Berichtigung

Der Bezirksbeauftragte für die BD Wuppertal — siehe BULTENO Nr. 1/62 — hat folgende neue Dienstanschrift: Graß, Willi, BI, BD Wuppertal, Büro To, 946/168.

Vere, verŝajne ŝtataj kaj urbaj instancoj, sindikatoj aŭ fervojaj eminentuloj pli forte estas impresataj, se 1000 personoj en kongreso ĉeestas ol 500. Tamen ne la nombro gravas, sed la interna forto de la unuopa kongreso. Dek forte vizititaj kongresoj sen interna forto eble mortigus nian fakan movadon, dum tri aŭ kvar kun „nur“ 300 ĝis 500 vizitantoj **kaj** konstruaj ideoj antaŭenpuŝos ĝin. Por LKK estas multe pli facile, organizi tian pli „familian“ kongreson, vere unuigi la kongresanojn en unu granda salono (ekz. dum interkonatiĝa vespero aŭ balo), tiamaniere ebligante al la partoprenantoj veran intermiksadon, pli ampleksan lingvouzadon kaj pli intimajn kontaktojn.

Jam antaŭ jaroj oni ekkonis, ke **fakaj** kongresoj ĉefe okupu sin pri **fakaj** aferoj kaj estu vizitataj de **fakuloj**. Pro tio en la kongresregularo, art. 8 staras: „Al la IFEF-kongresoj rajtas partopreni la

anoj de IFEF kaj ties familianoj. Esperantistoj-
nefervojistoj rajtas partopreni nur, se ili estas
aparte invititaj de iu landa estraro aŭ de la IFEF-
estraro. La nombro de la partoprenantoj ne-
fervojistoj estu kiel eble plej malalta. Rilate al
neesperantistoj-fervojistoj ĉiu landa grupo limigu
je tiuj personoj, kiuj verŝajne utilos al la movado.“
El tiuj vortoj klare estas videbla, ke la nombro
precipe de nefervojistoj laŭeble estu reduktata jam
flanke de la landaj asocioj. Nepre ne estu decidaj
financaj kaŭzoj, ekzemple por plenigi la kason de
LKK. Aliaflanke ja nur inter la fervojistoj ne-
esperantistoj ni daŭre devas serĉi niajn novajn
adeptojn, kaj, se tiaj homoj spertas la kongresan
vivon, oni tute certe ofte inter ili trovas se ne post-
kongresajn lernantojn, tamen simpatiuojn aŭ
eĉ propagandulojn por nia afero. Por altiri ilin,
sed ankaŭ por fari pli alloga la kongreson por la
tuta membraro, kompreneble kaj nepre ĝi enhavu
ankaŭ turismajn aranĝojn. Unu el la plej gravaj
taskoj de ĉiuj gvidantoj de lokaj aŭ regionaj
societoj, de kursoj aŭ studrondoj devas esti,
enplanti en la kapojn de novuloj aŭ simpatiuoj
(sinceraj) la deziron partopreni niajn kongresojn.
Sed mi nur povas substreki la opiniojn de mia
franca kolegino: oni atentu, ke la nombro de la
lingvaj nekapabluloj ne tro superas tiun de la
veraj esperantistoj, same grava tasko de ĉiu
gvidantoj. La baza esenco de **niaj** kongresoj
tamen restu la vorto „faka“. Multo ankoraŭ estas
faranda por povi uzi ĝin bonkoscience.

Ekzemple venis plendoj pri la, ni diru tro
primitiva enhavo de la fakprelegoj. Vere, la
ĝisnunaj prelegoj estas ĉio alia ol altnivelaj. Kial?
Ĉar (ankaŭ laŭ la regularo) ili unuavice celu la
progreson de la kongresanoj. Al tiuj oni ne povas
prezenti teknikajn ciferojn, nekompreneblajn
teknikajn detalojn ktp. Al niaj aŭskultantoj laŭ
ilia nuna strukturo nur utilas ĝenerale interesa
temo en por ili komprenebla prezentmaniero.
Tamen ankaŭ la alia flanko devas esti pripensata:
Post la kongreso la prelego i. a. servu kiel pruv-
materialo por la taŭgeco de nia lingvo. Estus bone
pro tio, se ĝi krome enhavus certajn detalojn,
kiujn estontece ni intencas publikigi en aparta
aldonaĵo al la tekstoj. Oni fine ne forgesu, ke la
nivelo de la fakprelegoj grandskale dependas de
tio, ĉu la koncerna landa asocio trovas fakulon,
kiu emas kaj **kapablas** verki nian kongresan
prelegon.

Venis plendoj pri la neakurata komenco de la
kunsidoj. Tio evidente estas unu el la plej gravaj
malsanoj de niaj kongresoj ek de komenco.
Preskaŭ neniam okazas, ke laborkunsido aŭ fak-

prelego komenciĝas je la fiksita tempopunkto.
Sed centoj akurate je la fiksita tempo ĉeestas, se
temas pri kongresekskurso. Eĉ la rigoraj anoncoj
de la hungara LKK ne influis tiun situacion.
Verŝajne nur helpas, se estontece la kunsidoj
komenciĝos tute precize, eĉ antaŭ malplena
seĝoj. Kelkaj landoj faru tion, kaj baldaŭ oni
vidos rezultojn.

Venis plendoj pri iom neuzorge vestitaj kon-
gresanoj, speciale dum solenaj aranĝoj. Cetere
UEA de jaroj luktas kontraŭ la sama problemo.
Povas esti, ke certa kvanto da kongresanoj iom
facilanime agis en tiu rilato kaj ne sufiĉe klare
ekkonis ĝian gravecon. Tamen laŭ miaj observoj
en la pasintaj jaroj ĵus tiu ĉi afero jam iom pli-
boniĝis en la IFEF-kongreso. Kaj tute certe ankaŭ
la malzorgema resto ekkonos, ke ne estas dece,
viziti balon aŭ oficialan akcepton kiel viro en
ĵerzo aŭ senjaka ĉemizo, kiel virino en trikita jako
kaj mallongaj ŝtrumpetoj, ke ne estas konvene,
ĉe la inaŭguro aperi sen kravato kaj en multko-
lora ĉemizo, dum ministro, urbestro, fervojaj
 eminentuloj honore al ni esperantistoj portas
minimume solenajn, malhelajn vestaĵojn. Ni estu
konsciaj pri tio, ke la aliaj homoj, tute speciale
la fervojistoj, prijuĝas nin laŭ nia ekstera konduto,
ĉar la orajn korojn de la esperantistoj ili ja ne
povas vidi.

Venis plendoj pri tio, ke ne estis disponigita
sufiĉe da tempo por la kunsidoj. Pravas la plendoj,
ĉar en ĉiu kongreso denove evidentiga, ke la
tempo por la kunsidoj ne sufiĉas. Aliaflanke oni
povus gajni multe da tempo, se ekz. la pritrakto
de salutleteroj kaj telegramoj antaŭe estus pre-
parata kaj se nur la plej gravaj punktoj el ili estus
menciataj. Sed ekzemple estus ĝentila gesto
kontraŭ la sendintoj, se poste en LIF oni publicus
ties nomojn kaj la specojn de la sendaĵoj. On
krome povus gajni multe da tempo, se **nur** la
punktoj de la tagordo estus traktataj kaj flanke
de la gvidanto rigore estus malebligata ĉiu provo,
tuŝi aliajn temojn. La gvidanto tiamaniere ankaŭ
povus malhelpi, ke problemoj estas surtabligataj,
kiuj jam antaŭ jaroj estas diskutitaj kaj deciditaj.
Tio estas trege teda por delegitoj, kiuj regule
partoprenis en ĉiuj kongresoj kaj tuj ekkonas,
ke la diskutado fariĝos sensenca kaj superflua.
Ĉi-rilate oni devas substreki la koncernajn frazojn
en la raporto de kol. Sekerés en „Jugoslavija
Fervojoj“.

Ĉu eble estus rekomendinde, trakti ĉi tiun
temaron en la delegitara kunveno en Stoke? Kion
opinion la landaj estraroj? Gießner

Kia Esperantisto vi estas?

Verŝajne vi konsentas, ke la esperantistaro konsistas el multaj kategorioj, malgraŭ tio, ke oni ofte nomas ilin „samideanoj“. Ni volas preparoli tiujn kategoriojn, kvankam ne eblas garanti, ke ni nomas ĉiujn.

1. Bonan-tagon-esperantistoj

Ilia vortprovizo estas tro limigita. Kelkajn esprimojn ili bonege scias, ekz. „bonan tagon“, „kiel vi fartas“, „ĝis revido“. Cetere ili ĉiam parolas nacilingve. Tre ofte ili portas grandan verdan stelon.

2. Eternaj komencentaj esperantistoj

Dum pli ol jardekoj ili jam studas la Internacian Lingvon, sed ili malmulte progresis. Kiam aliaj esperantistoj alparolas ilin, ili ruĝiĝas kaj ne scias respondi. Ĝenerale ili tre flue parolas nacian lingvon en esperantokunvenoj.

3. Filatelist-esperantistoj

Ili volonte korespondas kun ĉiuj landoj, sed nur por interŝanĝi poŝtmarkojn. Cetere ili ne partoprenas esperantistan vivon.

4. Vortar-esperantistoj

aŭ promenantaj vortaroj kontraŭe scias multege da esperantaj vortoj, precipe tiujn, kiujn oni preskaŭ neniam bezonas. Sed en interparolo kun aliaj ili mallerte balbutas; ili neniam legas libron (krom vortaro) kaj korespondi ili ne ŝatas.

5. Gazet-esperantistoj

opiniis, ke ĉiu kiu pli malpli bone scipovas Esperanton, havas taskon verki gazet-artikolojn. Tiu kategorio senesperigas verajn redaktorojn.

Iliaj plumfruktoj ne bongustas. Verkado postulas apartan talenton.

6. Klub-esperantistoj

loĝas precipe en grandaj urboj, kie la verda movado floras. Ili regule vizitas la kunvenojn en propra klubo, sed tute ne interesiĝas pri la distrikto, pri la landa aŭ internacia movado, pri kongreso k.t.p.

7. Kongres-esperantistoj

plejparte estas fraŭloj (ambaŭseksaj), loĝante izolite en malgrandaj lokoj. Ili havas amikojn en ĉiuj urboj, kie jam okazis internaciaj kongresoj. Sed en la propra loko, urbeto aŭ vilaĝo ili estas (kaj daŭro restos) la solaj esperantistoj.

8. Gramatik-esperantistoj

favore studas la teorion flankon de nia lingvo. Pri la plej subtilaj gramatikaj demandoj ili scias la sole ĝustan respondon. Ve, kiu uzas la lingvon ne laŭ iliaj konsiloj. Ĉiam ili havas ruĝan kraĵon en la mano.

9. Nur-esperantistoj

estas homoj, por kiuj la zamenhofs kreaĵo estas la sole ĝusta vivocelo. Ili interesiĝas pri nenio alia. Neniam ili legas nacilingvan libron aŭ ĵurnalon. Ilia domo estas plena de esperantaĵoj. Ili portas verdan stelon, verdstelajn ringojn, manikbutonojn, poŝttrancilojn, kraĵon; eĉ noktovestoj estas ornamitaj kvinpintstele. En ĉiu rondo ili parolas daŭre pri Esperanto, ĉiun ili salutas esperantlingve. Ili estas la plej bonaj kontraŭ-propagandistoj de nia movado.

10. Politik-esperantistoj

politikas sian ekstreman radikalan politikan opinionon, preferere en la verda movado; verŝajne tial, ĉar ekster tiu movado neniu aŭskultas ilin. Ili estas eksterordinare aktivaj. En ĉiu kunveno aŭ kongreso ili petas plurfoje la parolon, disdonas flugfoliojn, kolportas memverkitajn gazetojn k.t.p. Esperanto estas por ili politika ĉastereno.

11. Opozici-esperantistoj

Ili ŝatas aŭdi sin mem, sed oni malmulte povas diri, se oni samopiniis kun la gvidantoj. Tial ili ĉiam estas kontraŭ la agoj de la plimulto. Ili amas fortajn, akrajn kvalifikojn kaj senfinajn lamentadojn. Se oni volas kredi al ili, ĉiuj aktivuloj en niaj organizoj estas trompantoj aŭ profitemuloj aŭ diktatoroj.

12. Kritikemaj esperantistoj

Tiu kategorio daŭre observas, klasifikas kaj severe prijuĝas la samideanojn. Neniu taŭgas krom ili mem. La saĝa leganto aŭ aŭskultanto verŝajne jam konstatis, ke la verkinto de ĉi tiuj linioj estas unu el la plej tipaj reprezentantoj de ĉilasta kategorio. Probleme ni forgesis kelkajn kategoriojn. Ĉu vi, leganto, jam renkontis vian portreteton? Aŭ ĉu vi apartenas al la 13a kategorio?

13. La ordinaraĵoj esperantistoj

Ili estas progresemaj homoj, kiuj interesiĝas pri multaj aferoj i. a. ankaŭ pri Esperanto. Ili uzas la lingvon praktike kaj klopodas disvastigi ĝin. Por ili Esperanto estas bona rimedo por atingi altan, tuthomaran kulturon.

La birdfluglinio

De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto 1962 okazis en Kopenhago, la metropolo de Danlando, la 47a Kongreso de Esperanto, pri kiu oni legu en la koncernaj revuoj. Niaj danaj kolegoj aranĝis en ties kadro internacian kunvenon de la fervojistoj, kie estas farita prelego pri la aktuala temo de la birdfluglinio. En la artikolo „Nova pramlinio inter Germanio kaj Danlando“ (vidu n-ran 2 de BULTENO) ni skizis jam la nuntempan staton de la konstrulaboroj.

La prelego estis tre ampleksa kaj traktis la tutan problemaron ekde ĝia komenco. Laŭ dana vidpunkto oni povas iri reen en la historion ĝis la jaro 1000 p. K., de kiam estas rekonebla konstanta trafiko transmara. Detale estas priskribitaj la diversaj stadioj dum la sekvantaj jarcentoj. La evidenta problemo stariĝis konekse kun la konstruo de la fervojaj linioj. Post multaj preparoj kaj havigo de koncesioj ekfunkciis en 1886 la ŝiplintrafiko inter Gedser kaj Warnemünde. Ekde 1903 ĝi estis anstataŭita per fervoja pramlinio.

La birdfluglinio venis al la stadio de realaj projektoj. En 1910 estis fonditaj dana kaj germana komitatoj. Sekvis preparlaboroj kaj decidoj, sed nur dum la dua mondmilito la praktikaj laboroj sur la dana teritorio progresis.

Post la milito la unuaj kontaktoj inter Germanio kaj Danlando renoviĝis en 1950. Meze de 1951 komencis funkcii la ŝiplinio inter Großenbrode kaj Gedser, kaj baldaŭ sekvis la transveturo de fervojvagonoj. La trafiko intertempe kreskis tiel neimageble, ke la projekto de la birdfluglinio denove revigligis. Tio kondukis al konvencio inter la germana kaj dana tra-

fikministroj en 1958, per kiu la konstruo de la fervoja pramlinio inter Puttgarden (sur la germana insulo Fehmarn) kaj Rødy Faerge (sur la dana teritorio) definitive estis fiksita.

La preleginto nombris detale

Skandinavaj fakuloj de la ŝipveturado studas kun granda intereso ĉiujn raportojn pri granda soveta plano, interligi per nova kanalsistemo la Baltikan Maron kun la Nigra Maro. Tia por grandaj varŝipoj uzebla akvovojo estus grava ne nur por la baltikaj ŝtatoj, por Polujo kaj la orienta parto de Germanio, sed ankaŭ por la ŝipveturado de la landoj cirkaŭ la Baltika Maro kaj eĉ jam nun por iliaj novaj konstruaj planoj, ĉar tiuj estas influataj per la transportkapacitato de la kanalsistemo.

Temas ĉe tiu rusa plano ne pri tute nova ideo, sed pri malnova revuo de la nordaj maristoj: Ŝipveturi de la Baltika Maro trans la grandega rusa imperio ĝis la Nigra Maro. La rusoj supozeble pensas ĉefe pri uzado de la akvostrato en la inversa direkto: pri enŝipigo de ŝtonkarboj, koalko, metaloj, greno kaj eble ankaŭ oleo de Sudruslando kaj Kaŭkaso al la distrikto de la Baltika Maro kaj plue al Nordeŭropo. El tio rezultas eksterordinare interesaj perspektivoj. La evitado de longa marvojo tra la severe gardita Strato de la Dardaneloj, la Adriatika Maro, la Strato de

ĉiujn laborojn sur ambaŭ flankoj, la supozeblajn avantaĝojn, la novan kapaciton k.t.p. Bedaŭrinde mankis indikoj pri la divido de la kostoj inter la du landoj resp. la fervojaj administracioj. Ĉiukaze la aŭskultintoj, inter ili kelkaj GEFA-anoj sekvis kun intereso tiun temon pri unu el la plej grandaj projektoj, kiu jam post duona jaro grandskale pliboniĝos la fervojan transportkapaciton inter Skandinavio kaj Germanio. W. B.

Sovetaj projektoj de kanalkonstruado

Gibraltara kaj la Atlantika Oceano signifas eksterordinaran gajnon je tempo, mono kaj ŝipvolumo. La transportkostoj malpligrandiĝus, kaj la rusaj eksportvaroj fariĝus malpli kostaj. Inverse la konkurantoj de la rusoj perdis ŝancojn por la vendado de varoj, kaj la nove konstruita akvovojo estus laŭ trafikaj vidpunktoj pli sekura ol la ĝisnuna ĉirkau la sudpinto de Hispanio. La teknika problemo konsistas el tio, interligi la stromsistemojn de la Njemen (germanlingve Memel) kaj de la Pripjal, kiu fluas en la Dnjepr. Kelkaj artefaritaj lagoj kaj kanaloj estus necesaj. La hodiaŭ ankoraŭ netaŭga mallarĝa akvofoso poste interligos la apudajn riverojn Sjara kaj Jalselda. Sed ne estas certe, ĉu la granda kanalo sekvos tiun foston, kiu ankaŭ devos akcepti ŝipojn de volumo de 5000 tunoj. La soveta projekto de la kanalkonstruado estas same ampleksa kiel la granda Volga-Don-Kanalo; ĝia graveco por la trafiko kun la landoj ĉirkaŭ la Baltika Maro apenaŭ povas esti subtaksata.

(Tradukis el „Die Bundesbahn“ de E. Kruse)

Mezgermana fervojo antaŭ multaj problemoj

Per la postmilita divido de Germanio en okcidenta, meza kaj orienta parto suferas precipe la trafiko de Mezgermanio. El 31 fervojaj linioj, kiuj interligis ĝis 1945 la nunan okcidentan kaj mezan Germanion, estas interrompitaj 24 linioj; el 32 ŝtataj, 46 unuarangaj kaj 43 duarangaj stratoj, entute 121, estas malfermitaj 116. Nur la du transiraj kanalvojoj restis konservataj.

Ankaŭ la trafikvojoj trans la Oder-Neiŝe-linio al orienta Germanio grandparte malfunkcias. El 23 fervojaj linioj de okcidento al oriento estas veturigataj transire nur 7. Antaŭ 1945 ekzistis entute 151 trafikbloj (stratoj — pontoj — pramoj), el kiuj restis nur la aŭtomobila ponto sude de Frankfurt/Oder, rekonstruita en 1955.

Transportvolumoj ne sufiĉas

La fervojo en Mezgermanio havas ankoraŭ monopolpozicion. Ekz. en la jaro 1959 la Germana Regna Fervojo (DR) transportis pomonate 19,1 milionojn da tunoj t. e. 45% el la varoj entute transportitaj per la trafikentrepreno. La volumo pligrandigis po jare je 5%, sed tio ne sufiĉas por plenumi ĉiujn postulojn. La fervojo ofte staras en la centro de la oficiala kaj publika kritiko pro malplenumo de la planoj. Dum kulminaj trafikperiodoj, precipe dum la aŭtuno kaj la unaj monatoj de la jaro, regule evoluas transportkrizoj. Per alvokoj al la fervojistaro kaj al la popolo partopreni la „batalon por la venko super la trafikaj malfacilaĵoj“ oni provas superi la problemon.

Malmuntado kaj malabundoj

La kaŭzoj por la ĉiamaj malfacilaĵoj ĉe la DR estas:

- 1) la malmuntado de la dua trako en la jaroj 1945 kaj 1946,
- 2) la forveturigo de ŝarĝvagonoj kaj lokomotivoj kiel militviktimo kaj riparfaro en la jaroj 1945 ĝis 1947,
- 3) financaj kaj materiaj malabundoj en la havigo de reloj, vagonoj kaj lokomotivoj,
- 4) la manko de fakuloj en la funkciado kaj administrado krome manko de laboruloj por la rekonstruo.

La DR disponas pri reto de 16150 km konsistantaj el 7329 unuarangaj km, 7501 duarangaj km kaj 1320 etŝpuraj km. La funkcio okazas depost la malmunta periodo preskaŭ sencescepte sur unutrakaj linioj.

Dekoj da planoj — malplenumitaj

Dum la pasintaj jaroj dekoj da planoj estis starigataj por rekonstrui la trakojn kaj forigi la multnombrajn lokojn de deviga malrapida veturado. La rezultato estis modesta. La nuntempa sepjara plano projektas renovigi kvin ĉefliniojn, nome tiujn de Berlin al Rostock, al Dresden, al Magdeburg, al Frankfurt/Oder kaj al Erfurt. Krome oni volas novkonstrui 700 km, supozeble ne kiel duan trakon, sed precipe kiel aliĝliniojn de industriaj fabrikoj kaj militaj flughavenoj. Evidente estas konstatebla la malkonsidero de porfervojaj interesoj kompare kun la cetera peza industrio.

Elektrecigo en la una stadio

Ĝis 1945 estis elektrecitaj en la teritorio de la nuna Mezgermanio 495 km (= 3%) de la fervoja reto. Ĉiuj instalajoj

estas malmuntitaj kaj transportitaj orienten. En 1957 komenciĝis denove la elektrecigo sur la linio Leipzig — Magdeburg. Elektrece funkciigataj estas nur 250 km.

Mankas lokomotivoj kaj varvagonoj

La malmuntado kaŭzis tre fortan perdon en la vagonaro, ĝis hodiaŭ ne rekompencitan. Antaŭ la milito estis disponeblaj tie 6800 lokomotivoj. En 1948 restis nur 2600. La stoko pligrandigis al 4200 per renovigo de malnovaj lokomotivoj, sed mankas ankoraŭ ĉirkaŭ 1000. La stoko estas tro malnova. La plej granda parto de la lokomotivoj por varvagonaro apartenas al la serio 52, siatempe, dum la milito, konstruita por maksimume kvin jaroj. Similas la situacio en la stoko de varvagonoj, kiuj estas nur 60% de la antaŭmilita stoko. Nuntempe ekzistas ĉirkaŭ 130000 varvagonoj kun meza aĝo de 30 jaroj. Dum la pasintaj kvin jaroj estas nove konstruitaj nur 12500 varvagonoj. Ĝis 1965 entute nur 16000 novaj varvagonoj estos anstataŭintaj la plej malnovajn, kvankam kapableco de la vagonindustrio estas pli granda. Vagonfabrikoj estas en Görlitz, Ammendorf, Dessau kaj Bautzen, sed ili laboras ekskluzive por la eksporto de fervojaj vagonoj al orient-blokaĵ ŝtatoj. Ankaŭ la produktoj de la lokomotivfabrikoj en Potsdam-Babelsberg kaj Henningsdorf estas destinitaj grandparte al la eksporto. Novajn, modernajn dizelaĵn kaj elektrajn lokomotivojn la DR ne ricevis, kvankam jam por 1959 estis anoncigitaj grandaj serioj de nove konstruitaj lokomotivoj.

(El „Der Deutsche Bundesbahnbeamte,“ traduk. de W. B.)

Neue Bücher:

„Jugû mem“

„Faktoj pri Germanujo“, haben im Ausland verschiedener Nachahmer gefunden. In „Jugû mem“ wird versucht, über die heutige Tschechoslowakei ein anschauliches Bild zugeben. Trotz reichlicher Bebilderung und statistischer Angaben dient die Broschüre weniger der sachlichen Informierung als politischer Propaganda. Der geschichtliche Rückblick wird nur mit den Augen des jetzigen Regimes unternommen, wobei die Existenz der Sudetendeutschen wie auch ihre Vertreibung völlig ignoriert wird. Die BDR Deutschland rechnet zwar zu den industriell hoch entwickelten Ländern, politisch wird ihr jedoch Kriegslüsterheit vorgeworfen.

Die Realpreise werden anhand der angewendeten Arbeitszeiten dargestellt. Ein durchschnittlich bezahlter Arbeiter hat im Jahre 1959 z. B. für 1 Kilogramm Butter 5 Stunden und 40 Minuten und für 1 Herrenhemd fast 7 Stunden gearbeitet. Die Angaben über den Eisenbahnverkehr auf dem 13139 km betragenden Netz sind dürftig.

Jugû mem, Faktoj pri Ĉeĥoslovakio, herausgegeben vom Verlag Orbis, Prag, 116 Seiten mit Fotos und einer mehrfarbigen Karte. Erhältlich gegen 1 internationalen Antwortschein bei Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanická 4, Praha 2, Ĉeĥoslovakio.

„Wörter der Gegenwart“

Wenn man von dem Vorwort ausgeht, wurden die Ausdrücke des „Aktuala Terminareto“, die in der „Germana Esperanto-Revuo“ erschienen, zu einem kleinen Büchlein zusammenfaßt. Hiermit ist man einem vielfachen Wunsch nachgekommen. Lexikographisch folgt Hans Wingen seinem bewährten Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Auf 53 Seiten sind zahlreiche Ausdrücke untergebracht, die in der Gegenwart durch das Zeitgeschehen

Bedeutung und umfassenderen Gebrauch erlangt haben.

Der Autor wendet seine Aufmerksamkeit auch dem schwierigen Gebiet der neu entstandenen Wörter zu. Ihre Form ist zunächst nicht fest geprägt, sondern schwankt noch. Der ursprüngliche Begriff umfaßt auch etwas anderes und muß sich mit der Zeit zum endgültigen Begriff wandeln. Bei der Fülle dieser Ausdrücke hätte hier und da eine Straffung nicht geschadet. So erscheinen etwa die Begriffe Grünkernmehl, Konzessionschulze, Nippflut, Rөггелchen, Streubüchse oder Völkerschlacht nicht unbedingt typisch für unsere Gegenwart. Nützlich ist der Anhang, der sich mit der allgemeinen Wortbildung bei internationalen, neu eingeführten Bezeichnungen sowie mit lexikographischen Erklärungen befaßt.

„Wörter der Gegenwart“, Deutsch-Esperanto, 56 Seiten, broschürt, Verfasser Hans Wingen, Herausgeber: Esperanto-Verlag Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Preis 3,90 DM, zuzüglich 0,30 DM Versandkosten.

Nova preĝejlibro.

Kirchliche Stellen geben ihre Zurückhaltung gegenüber der

Ne ĉion kyredu, kion vi aŭdas;
Ne ĉion amu, kion vi vidas;
Ne ĉion diru, kion vi scias;
Ne ĉion faru, kion vi volas.

Proverbo

Internationalen Sprache nur langsam auf. Es ist daher zu begrüßen, daß in dem Bestreben, die christlichen Gläubigen in ihrer Heimatsprache mit den Gebetstexten der frühchristlichen Zeit vertraut zu machen, neben europäischen, asiatischen und afrikanischen Sprachen auch Esperanto verwendet wird. Das vorliegende Bändchen, dessen übersetzter Titel „Unermeßlicher, wir preisen Dich“ lautet, enthält Gebete für alle Christen im Geiste der Chrysostomus-Liturgie. Auch religiös Uninteressierte überraschen die nach 1500 Jahren immer wieder aktuellen Texte, die bezeugen, daß die religiösen Anliegen die gleichen sind.

„Neelmezurebla Ni Laŭdegas Vin“, 34 Seiten im Format 9 x 15 cm, Zweifarbendruck. Herausgeber: Verlage Thomas in Zürich und Schöningh in Paderborn/Wien. Preis. Gebunden 1,80 DM, kartoniert 1,20 DM. W.B.

Neues

Zamenhof-Denkmal geplant

Die Esperanto-Vereinigung in Linz (Österreich) hat vom Magistrat der Stadt die Erlaubnis erhalten, in der Nähe des Hauptbahnhofes ein Denkmal zu Ehren Dr. Zamenhofs, des Schöpfers der internationalen Sprache Esperanto, zu errichten. Die Vorbereitungen hierfür sind im Gange. Da der größte Teil der Kosten von den Esperantisten selbst zu tragen ist, bittet die Esperanto-Vereinigung, ihr bei der Errichtung eines würdigen Denkmals finanziell zu helfen. Vielleicht bietet das Jubiläum des vor 75 Jahren herausgegebenen ersten Esperanto-Buches einen

Anlaß für eine entsprechende Gabe.

Die Namen der Spender werden laufend in den Zeitungen veröffentlicht. Jene Namen der Spender, die mehr als 50 ÖS überweisen können, werden in der Urkunde des Denkmals verewigt.

Spenden erbeten an:

Ausschuß zur Errichtung eines Zamenhof-Denkmal in Linz/D: Joh. Geroldinger, Marcusgang 7, Scheckkonto Nr. 138590 Allgemeine Sparkasse Linz Konto Nr. 405086.

Ni legis en ...

Wegen Platzmangels kann dieses Mal nur eine Zeitschrift besprochen werden.

Interlingvistika Informa Servo, organo de la Societo por Internacia Lingvo kun la sidejo en Flensburg (Germanio). Inter la amaso de revuoj kaj gazetoj tiu multobligata presajo havas apartan rolon. Kiu serĉas traktadon de temoj el vidpunkto de ne nur propagandcele pensanta esperantisto, trovas plenumitaj siajn atent-ojn. Eble la opinio de la kunlaborantoj elradiiĝas tro grandan skeptikon, almenaŭ laŭ germana vidpunkto. Sed la postuloj krei lingvistikajn katedrojn en la universitatoj ŝajnas momente la plej taŭga solvo por superi la ĝeneralan stagnadon de la publika intereso pri la internacia lingvo entute. La tendenco serĉi bonajn, eble eĉ novajn vojojn por inter-esigi la sciencistojn pri interlingvistiko estas ĉiaukaze laŭdinda kaj subteninda flanke de ĉiuj serioze agantaj esperantistoj.

El n-ro 1/1962 sekvas la ekstrakto pri „Turistoj en eksterlando“:

Turistoj en eksterlando estas grava faktoro en la interrilatoj de la popoloj. Laŭ novaj raportoj prezentitaj sur kunveno de la germana turistoficeja organizo ĉirkaŭ 40% el la loĝantaro en okcidentaj landoj kaj Usono kutimas vojaĝi dum la ferioj entute kaj triono el ili vojaĝas eksterlandern. La vojaĝoj daŭras meze du semajnojn. Germanaj vojaĝantoj elspezis dum la lasta jaro enlande 2800 milionojn da germanaj markoj kaj eksterlande 3850 milionojn (preskaŭ 1000 milionojn da dolaroj). Kiel vizitataj landoj estas preferataj de la germanoj Aŭstrio kaj Italio, krome Svislando, Francujo, Hispanio, sed ankaŭ Skandinavio, Jugoslavio, Grekujo kaj la Proksima Oriento. Okaze de kunveno en la akedemio

de Sandelmark la sociologo d-ro Knebel (universitato de Munster) prelegis pri la problemoj de la turismo. Li konstatis ke ne la deziro refreŝigi per vojaĝo estas plu la ĉefa celo de la homoj, sed la intenco estigi specialan impreson en la kunhomoj. Tial ili skribas multkolorajn poŝtkartojn el fremdaj landoj, algluas plakedojn sur siajn aŭtojn kofrojn, kunportas memorajojn el fremdaj landoj por montri post la reveno hejme. Do feria vojaĝado estas pli kaj pli afero de socia prestiĝo. El tio rezultas ankaŭ, ke la ferianto en eksterlando ne estas tro interesita koniĝi kun la fremda lando kaj popolo. La vojaĝa societo forprenas deli ĉiun riskon kaj organizas ĉion. Li nur vidas la landon el al aŭtobuso kaj rigardas la belon de la pejzaĝo tra la linso de sia fotoaparato. La homoj el la fremda lando estas montrataj al li sur organizitaj hejmvesperoj. Ĉu tiaj homoj vojaĝantaj povos interesiĝi pri veraj homoj kontaktaj? Ĉu ili povos interesiĝi pri interlingvo!

W. B.

Denove faldprospekto de la DB en Esperanto

„Tra Germanio per la Federacia Fervojo“ nomiĝas nova faldprospekto, kiun ĵus eldonis la Germana Federacia Fervojo (DB) kune kun la Germana Centrejo por Fremdultrafiko (ZfV). Estas cetero la oka reklamilo, kiu estas presata laŭ instigo kaj kun traduka helpo de nia asocio. Unu flanko konsistas el koloriĉa bildkarto de Okcidentgermanio, kie estas videblaj konstruaĵoj aŭ fenomenoj tipaj por la koncernaj lokoj. La alia flanko donas kon-

silojn kaj informojn pri la pasaĝera kaj pakaja transporto perfervoje. Multaj aktualaj kolorbildoj ilustras la nuntempan modernan Germanan Federacian Fervojon.

La disdono de la senkoste haveblaj prospektoj estas denove en la manoj de nia asocio. Ni esperas, ke post longtempaj preparoj la prospektoj estos baldaŭ disponeblaj.

Interesuloj el Germanio petu la prospekton germanlingve de nia adreso, eksterlandanoj esperantlingve.

Esperantistoj, jen okazo por praktike demonstri vian intereson por Esperanto!

Turismaj broŝuroj

La Turisttrafika Asocio de Lund presigis novan kaj interesan prospekton pri la universitata urbo Lund. La broŝuro estas mendebla ĉe „Lunds Turisttrafikförening, Knut den stores gata 1 D, Lund/Svedio“.

Alia universitata urbo, nome Göttingen, eldonis koloran faldprospekton, kiu estas havebla per la urba Fremdultrafikoficejo Adreso: Fremdenverkehrsamt, 34 Göttingen.

Anekdotoj


La plej nova amuzruzaĵo de elektroncerbeĝo estis prezentata de la prezidanto de la elektronindustrii unuigo en Londono. La taskon traduki la proverbon „for de okuloj, for de memoro“ el la angla en la rusan lingvon, la elektroncerbeĝo tute senerece plenumis. Sed kiam sekvis poste la ordono retraduki la frazon en la anglan lingvon, la aparato elspulis nur du vortojn: „kompleta idioto!“

En Hamburgo mi vane provis telefoni. Kiam mi ĉifine ricevis la plendakceptejon mi algrumbliis, jam iomete nervoza, la telefonfraŭlino: „Diru al mi, fraŭlino, ĉu mi estas idiota aŭ vi?“ Jen reatidiĝis dolĉa voĉo: „momenton, mi petas, mi donos al vi la informojn“.

(Traduk. de E. Ritterspach)

Nia jarkunveno

Nur malmulte da tagoj ankolektiĝos en la tradiciriĉa vestkoraŭ pasos, ĝis kiam ni ĝerfalia urbo Münster por okazigi manaj fervojistaj esperantistoj nian 6an jarkunvenon konekse



La fervoja lernejo en Münster, kiu gastigos nin

Anoncoj

Laŭ cirkulero n-ro 1 (julio 1962) fondiĝis la Laborunuigo de Esperantistaj Magnetofonatoroj en Germanio sub la gvidado de s-ro Günter Conrad, 8 München 42, Landsberger Str. 257 a. Kiu deziras partopreni magnetofonan rondon internacian, t. e. cirkuligi sonbendojn tra pluraj landoj kaj interŝanĝi seriojn da diapozitivoj kun sonbendaj klarigoj en Esperanto, turnu sin al la supre nomita adreso.

La germana dumonata revuo „Ton-Magazin“ publikas senpage adresojn de magnetofonatoroj, kiuj, deziras korespondi per sonbendoj kun esperantistoj. La ĝenerale uzata rapideco estas 9,5 cm/sek. Listo kun la ĝisnunaj aperintaj adresoj havebla per la supre nomita Laborunuigo. Aliaj interesuloj skribu al: „Ton-Magazin“, Ortherstr. 6, 8 München 25, Germanio.

Se vi deziras korespondi kun danaj fervojistaj geedzoj, skribu al la Dana Esperanta Fervojista Asocio, Korespondanta Servo. Adreso: S-ro J. K. Pedersen, Middelfartvej 191 II, Balbro/Danlando.

Korespondadon deziras 28jara komentantino. Adreso: F-ino Yolanda Sánchez Anchía, Grecia (Alauela,) Costa Rica.

Korespondadon, ankaŭ en angla lingvo, interŝanĝon de diskoj kaj jurnalaj deziras 28jara akademiano. Adreso: S-ro Beltran S. Coua Velasquez, Z Apartado n-ro 2.222, Correo Principal Caracas/Venezuela.

Korespondadon, precipe pri lingvaj demandoj deziras 72-jara pensiulo. Adreso: S-ro Theo Löttsch, (10b) Frohburg i. Sa. (Kreis Geithain), August-Bebel-Straße 18.

kun la regiona kunveno de REVELO. Kiel la antaŭaj kunvenoj, kiuj dum la lastaj jaroj adoptis la karakteron de internacia kongreso, ankaŭ la tiujara promesas prezenti al la partoprenantoj allogan programon. Supozeble la IFEF-estraro honorigos nin per la partopreno de pluraj reprezentantoj. Francaj ges-anoj zorgos pri teatra prezentado. La preparoj estas en la manoj de kapablaj gekolegoj. Oni povos esperi, ke la vere esperantista sfero, kiun ni ĝuos, antaŭpuŝos nian agadon por-esperantan.

Do, kiu hezitis ĝis nun, turnu sin tuj al sia distrikta komisiito aŭ direkte al „S-ro BOJ Schrapp, Personalbüro — P 2 — der Bundesbahndirektion Münster (Westf.)“.

Venu multnombre al Münster (Westf.) la 20/21an de oktobro 1962

Internacia Seminario

La Germana Esperanto-Junularo alvokas partopreni multnombre la 6an Internacian Seminarion, kiu okazos inter la 27a de decembro 1962 kaj la 2a de januaro 1963 en la junulargastejo de Rüsselsheim/Main. La ĉeftemo pritraktos „Ĉu naciismon sekvas internaciismo?“. Krome okazos akcepto en urbodomo, vizito al la urbo, ekskurso al Frankfurt, lumbildprezentadoj kaj silvestra balo. Gejunuloj malpli ol 25-jaraĝaj pagos 50. — gm, pliaĝaj 60 — gm. Aligojn oni sendu ĝis la 15a de novembro 1962 al „Germana Esperanto-Junularo, 29 Oldenburg, Am Festungsgraben 53“. Necesas antaŭpago de 10. — gm al „Deutsche Esperanto-Jugend, 29 Oldenburg, postĉekoficejo Karlsruhe, n-ro 54577“

Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Barnickel, 6000 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Sekretariat/sekretario: Elfriede Kruse 6000 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Vorsitzender/prezidanto: Joachim Gießner, 3210 Elze/Hann., Bahnhof. Manuskriptoj estu maŝinskribitaj (nur sur unu paĝo de la folio), kaj la distanco inter la linioj estu 1½.

Druck/preso: Limburger Vereinsdruckerei, 6250 Limburg/Lahn